


LA JUNA VIVO

DUŜEMAJNA
ORGANO



POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75
Unuobla ekz. f 0.03
duobla ekz. f 0.06
Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
(0.7 dol. 2.1 Sv. fr.)

Por progresintoj.

LA BLINDA POETO KAJ LA ALAŬDO.

En unu el la plej mallumaj kaj plej mallarĝaj stratetoj de Londono loĝis antaŭ multaj jaroj blinda poeto. Lia malgranda mansardo rigardis sur senfinan maron da tegmentoj.

Ne tiel blinda li estis, ke li ne povis distingi la taglumon de la mallumo; kaj ankaŭ sian metion de ŝuflikado li povis daŭrigi. Nur iom post iom li estis perdinta la vidon kaj li tiel kutimis uzi la alenon kaj frapadi, ke eĉ dormante li povus fliki la ŝuojn.

Li havis ĝuste sufiĉe da klientoj por ne malsatmorti. Sed ili kelkfoje grumblis, kiam ili devis suprengrimpi la sepdek ŝtupojn al lia mansardo.

Frapante la ŝuplandojn aŭ flikante la ŝuojn, li kantetis ĉiajn melodiojn, kiujn li mem faris, mirinde dolĉajn kaj belsonajn.

Kelkaj homoj diris, ke ĉi tiujn kantojn, kiam li ankoraŭ estis juna, oni kantis sur ĉiuj stratoj de Londono, kaj, ke ĉiu homo ŝatis akcepti la poeton en sian domon. Tiutempe la ŝuisto ricevis tiom da invitoj por tagmanĝi, ke li faris liston el tiuj. Kun fermitaj okuloj li pikis en ĝin per kudrilo kaj poste li iris al tiu domo, kiun li trafis per la kudrilo.

Sed post kelka tempo iu diris, ke la kantoj tute ne estas tiel belaj kaj dolĉaj. Kaj post tio ili elmodiĝis kaj forgesiĝis. Nur kelkaj homoj restis fidelaj, sed tiuj estis tro malriĉaj por doni tagmanĝon. La ŝuisto tamen ne plendis; — ho ne, eĉ ne tiam, kiam li devis transloĝiĝi al la tiom alte kuŝanta mansardo. Li manĝis sian en akvon trempitan panon kun plej granda apetito kaj daŭrigis la frapadon sur la ŝuplandojn de la klientoj.

La ŝuisto havis unu amikon, Billi, malriĉa, gaja viro, kiu ĉe stratangulo la ŝuojn de promenantoj ciris, kaj tiel perlaboris sian panon.

Foje Billi ricevis ŝilingon de malavara kliento. Li preskaŭ ne povis kredi al siaj okuloj. Kaj antaŭ ol li konsciis, li estis jam sur la foirejo kun sia trezoro.

Tie staris dekduoj da kaĝoj kun birdoj. Malgrandajn fringelojn li vidis, mizere enfermitaj en etaj kaĝetoj; kanariojn, kiuj de temp' al tempo kantis dolĉan melodion, kvazaŭ ili revis pri pli vasta kaĝo; grizan papageton el la arbaregoj de Brazilio, kiu kelkfoje babilis en fremda lingvo, kvazaŭ ĝi petis, ke oni aĉetu ĝin. Sed la kaĝo, kiu plej plaĉis al Billi, enhavis grizan alaŭdon. La birdeto ŝajne rimarkis, ke la ciristo alrigardas ĝin, kaj serioze ĝi provis kanti.

Post ioma marĉandado Billi ekhavis la birdon kun la kaĝo por sia ŝilingo.

Li pendigis la kaĝon sur la muron de sia subtegmenta ĉambreto. „Nu,” diris Billi al la alaŭdo, „ĵus vi volis ekkanti. Nun vi ne time forkaŝu vin! Faru al vi la malliberejon kiel eble plej agrabla. Mia ĉambreto ne estas multe pli bona! Mi ankaŭ ĉiufoje puŝiĝas per la kapo al la plafono. Kaj provu perlabori la semon per kantado. Mi ĉiam aspektas gaja, kiom mizere mi fartu. Se foje mi ree renkontos malavaran klienton, mi aĉetos por vi pli grandan kaĝon. Kantu nun por mi, vi friponeto, kaj rakontu al mi pri arbaroj kaj verdaj herbejoj, kiujn jam tiom longe mi ne plu vidis. Nu, venu el via anguleto, kaj kantu!”

Sed la alaŭdo ne volis kanti.

Fine Billi decidis ĝin vendi, eĉ se necese por la duona prezo. Kion utilis al li birdo, kiu ne kantis!

Do tiam li suprengrimpis la sepdek ŝtupojn al la mansardo de la ŝuisto. La maljunulo aĉetis la birdon kaj Billi por li pendigis la kaĝon.

Frap, frap, frap, faris la martelo, kaj la alaŭdo ektimis kaj batis per siajflugiloj la kradstangojn.

Ordinaraj homoj kiel Billi ne povis kompreni, kion la alaŭdo diris, sed la maljuna, blinda poeto povis tion, ĉar lia aŭdo estis tiel subtila.

„El-lasu min, el-lasu min,” diris la besto. „Aliaj homoj ne komprenas, sed vi — vi ne kuraĝos teni min, se vi mem kantas. Mi mortflugos min kontraŭ la krado, kaj tio estos via kulpo!”

La blinda poeto tremis.

„Aĥ ne, eta kompatindulo, ne faru tion!” petegis la poeto. „Mi ellasos vin. Forflugo en la freŝan aeron kaj sunbrilon. Rapidu, al la Nordo, al la violkolora erikejo, kie murmuris klaraj riveretoj sur la silikfluejoj. Proksime staras malnova domo; tie mi ludis, kiam mi estis infano. Vi povos rekoni ĝin laŭ la rozoj, kiuj kreskas ĉirkaŭ la fenestroj; ili floras malfrue, kiam ĉiuj aliaj jam velkis. Aŭdigu do malgrandan kanteton, pro mi.”

Li malfermis la fenestron kaj la kaĝopordeton kaj la alaŭdo forflugis.

Ho, kiom ĝi kantis!

„Aŭdu!” diris la homoj en la strato, dum ili suprenvidis. „Jen estas alaŭdo kaj kiom ĝi kantas! Kion ĝi volas ĉi tie!”

„Libera, libera!” kantis la alaŭdo ĉarme, sed la bruoj de la radoj kaj la kriado de la kolportistoj sufokis, kion ĝi plie kantis.

Kaj ĝi ne povis resti momenton por ree diri tion, ĉar ĝi sopiris tiel al la Nordo, al la viola erikmonteto, kie la klara rivereto murmuris sur la blankaj silikejoj, kaj kie staris la malnova domo kun la malfruaj rozoj ĉirkaŭ la fenestroj. Kaj jam antaŭ sunsubiro ĝi volis esti tie.

(Laŭ Ethel Carnie)

El la holanda tradukis: VANE.

MAGIA KVADRATO.

1	2	3
2	4	5
3	5	6

k, n, n, n, r, u, u, u, u.

La signifoj de l' vortoj:

- 1 2 3 Prepozicio.
- 2 4 5 Cifero.
- 3 5 6 Konjunkcio.

B. REICHBERG.

MAGIA TRIANGULO.

	1	2	3
1			
2			
3			

a, o, o, o, v, v.

La vortoj en konformaj vicoj horizontale kaj vertikale signifas:

1. Parencon.
2. Nomon de la Esperanta litero.
3. Literon.

Riga.

Sendu la solvojn antaŭ 15 Okt. al: C. van Tussenbroek, Minerva-laan 39 huis, Amsterdam, Nederlando.

Al kvar bonaj solvintoj ni donacos libreton. Nomoj kaj solvoj en la 8a n-o.

„JUNULARO, FORMU RONDON!”
(LUDMILA JEVSEJEVA)

JU-NU-LA-RO, FOR-MU RON-DON GLORA SONU
KAN-TO AL IDE-O ZAMEN-HOFA, LINGVO-ESPE-RANTO!

Junularo, formu rondon!
Firme harmonian,
Kun devizo en la koro:
„Amu lingvon nian!”

Junularo, formu rondon!
Hor' decida venos,
Pro laboro tiel bela
Vin Estonto benos.

Riga, Letlando.

LUDO.

Fari vortojn.

Jen ludeto, kiu plaĉas al infanoj kaj plenaĝuloj!

Oni prenu longan vorton, kaj ĉiu el la kunludantoj konstruu el la literoj de tiu vorto kiel eble plej multajn vortojn, en dek minutoj.

Tiu, kiu havas post dek minutoj la plej multajn bonajn vortojn, povas elekti novan vorton.

Ekzemplo: LERNOLIBRO — lerni — libro — bero — bone — biero — brilo — libero — k.t.p.

N. K.

West-Graftdijk.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Aperis artikoloj aŭ notoj pri „La Juna Vivo” en: Svenska Arbetar Esperantisten No. 9. „La Socialisto” No. 3. „Der Deutsche Esperantist” Nr. 8—9. „Ondo de Daugava” No. 9.
2. Mendu por grupoj kaj kursoj „La Juna Vivo” ponumere, tiam ĉiu povas legi la gazeton.
3. La 8a numero aperos 15 Okt.
4. Se ni povos plenigi almenaŭ 2 paĝojn per *anoncoj* kaj *korespondadresoj*, tiam ni povos eldoni la gazeton 12-paĝe.

POR KOMENCANTOJ.

LA TRO GRASA KOKINO.

Virino havis kokinon, de kiu ŝi ĉiutage ricevis unu ovon. La virino ne estis kontenta pri tio. Ŝi estis tre avara, kaj deziris de la kokino ĉiutage du ovojn: unu ovo antaŭtagmeze kaj unu posttagmeze.

Ŝi pli kaj pli abunde nutris la kokinon, sed ŝi rikoltis malprofiton. Pro la abunda nutraĵo la kokino fariĝis tro grasa, kaj la avara virino ricevis eĉ ne plu unu ovon.

Ŝi devis buĉi la senvaloran kokinon.

(Tradukaĵo el la Germana)

Schattendorf, Aŭstrujo

J. WIESBÖCK.

1. Kopiu la rakonton en vian kajeron.
2. Legu kelkfoje la rakonton kaj respondu al la demandoj:

- | | |
|---------------------------------|-----------------------------------|
| 1. Kion havis la virino? | 8. Kion ŝi faris? |
| 2. Kion ŝi ĉiutage ricevis? | 9. Kion ŝi rikoltis? |
| 3. Ĉu la virino estis kontenta? | 10. Kial ŝi rikoltis malprofiton? |
| 4. Kiu estis tre avara? | 11. Ĉu ŝi ankoraŭ ricevis ovojn? |
| 5. Kial ŝi ne estis kontenta? | 12. Kiu buĉis la kokinon? |
| 6. Kion ŝi deziris? | 13. Kion ŝi buĉis? |
| 7. Kiom da ovoj ŝi deziris? | 14. Kial ŝi buĉis la kokinon? |

LUPO KAJ VULPO.


Lupo kaj vulpo kune preterpasis kaptilojn. En unu el tiuj kaptiloj oni pendigis anseron. Ambaŭ bestoj estis tre malsataj, tamen la vulpo tute ne rigardis la anseron. „Kial, baptopatrino, vi ne rampas al tiu kaptilo?” demandis la lupo, „Jen pendas ansero!” „Hodiaŭ estas por mi fastotago. Mi ne rajtas manĝi viandon.” respondis la vulpo.

La lupo rememoris iun fastotagon, en kiu ĝi ne atentis la faston kaj manĝis viandon. Ĝi do ekrampis al la ansero, sed tamen ne atingis ĝin, ĉar ĝi pendigis sin mem en la kaptilo.

Nun la vulpo kuraĝe rampis al la ansero kaj formanĝis tiun. „He, baptopatrino, por vi estas hodiaŭ fastotago!” diris la mortanta lupo. „Por tiu estas fastotago, kiu pendigis sin mem,” respondis la vulpo.

(Litova popolrakonto)

A. PRAPUOLENIS.



C.H.

LA KVINA LECIONO.

- | | | |
|-------------------|-----------------|---------------------|
| 1. letero | 7. maniko | 13. dekstra mano |
| 2. leter-kesto | 8. butono | 14. maldekstra mano |
| 3. leter-portisto | 9. ĉapo | 15. litero |
| 4. gazeto | 10. pantalono | 16. numero |
| 5. tornistro | 11. sojlo | 17. nomo |
| 6. jako | 12. pordo-kadro | |

Lernu:

- | | |
|--------------|-------------------|
| granda pilko | — malgranda pilko |
| dekstra mano | — maldekstra mano |
| longa nomo | — mallonga nomo |
| ordaj haroj | — malordaj haroj |

Kaptu la okazon kaj presigu en „La Juna Vivo”
Korespondadreson: Ĉiu vorto: 0,03 gld.

„LA JUNA VIVO.”

A

1. La leterportisto **iras al** la domo.
2. **Li** estas esperantisto.
3. Granda, verda stelo estas sur la maniko.
4. En la dekstra mano estas **interesa** letero **el fremda** lando.
5. Sur la letero estas **kompleta adreso** kun **dato** kaj **poŝtmarko**.
6. La letero estas en blanka **koverto**.
7. La **blonda** knabo **kuras** al la leterportisto.
8. Li **ridas, ĉar** la leterportisto ankaŭ **portas** „La Juna Vivo”.
9. „La Juna Vivo” estas **internacia** gazeto.
10. **Ĝi do** estas gazeto **por** Francoj, Germanoj, Belgoj, Svedoj, Danoj, **k.t.p. (kaj tiel plu)**
11. „La Juna Vivo” estas gazeto por knaboj, knabinoj, fraŭloj, fraŭlinoj, **sinjoroj** kaj **sinjorinoj**.
12. Ĝi estas gazeto por **ĉiuj homoj** en la **tuta mondo**.
13. Portu „La Juna Vivo” al ĉiu domo, al ĉiu familio.
14. Ĉiuj homoj unu granda familio!
15. **Jen** la bela **tasko de** la esperantistoj!

- a. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- b. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.

B

- | | |
|--|---|
| 1. Kien iras la leterportisto ? | Li iras al la domo. |
| 2. Kien kuras la knabo ? | Li kuras al la leterportisto. |
| 3. Kie estas la sojlo ? | Ĝi estas sub la pordo. |
| 4. Kie estas la pordokadro? | Ĝi estas ĉirkaŭ la pordo. |
| 5. Kien iras la gazetoj ? | Ili iras al multaj fremdaj landoj. |
| 6. Kie estas la butonoj ? | Ili estas sur la jako. |
| 7. Kie estas la leterportisto kaj la knabo ? | Ili estas antaŭ la domo. |

- a. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
- b. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.

C

Respondu per ĝi, li kaj ili:

- | | |
|--------------------------------|--|
| 1. Kien iras la leteroj? | 8. Kie estas la litero, la numero kaj la nomo? |
| 2. Kien kuras la knabo? | 9. Kio estas la leterportisto? |
| 3. Kien iras la leterportisto? | 10. Kia estas la stelo? |
| 4. Kie estas la leterkesto? | 11. En kio estas la letero? |
| 5. Kie estas la letero? | 12. Kio estas „La Juna Vivo”? |
| 6. Kie estas la fenestroj? | |
| 7. Kie estas la verda stelo? | |

LA JARABONO ESTAS:

Aŭstrujo	3.20 ŝil.	Germanujo	1.75 M.
Britujo	3 ŝil.	Hispanujo	5 pes.
Belgujo	15 fr.	Hungarujo	3.30 p.
Ĉeĥoslovakujo ..	16½ Ĉ. kr.	Latvujo	2. l.
Danujo	3 kr.	Norvegujo	2.7 kr.
Francujo	10 fr.	Polujo	3.6 zl.
Svislando	2. 10 fr.	Rumanujo	72 l.
U.S.A.	0.70 dol.	Svedujo	2.70 kr.
Bulgarujo	58 lev.		

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen. Belga ĝironumero 335183.

Bulgarujo: Ivan Krestanov, str. 6 Septemvri, Sofia.

Danujo: S.rino M. Jensen, Galtrup, Erslev.

Francujo: S.ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d'Or.
ĝironumero: Cheque postal No. 12025 Dijon. (Côte d'Or)

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana ĝironumero: „Köln 104097”.

Hispanujo: S.ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2º, 3º, Barcelona.

Svedujo: John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

Oni povas pagi per poŝtmandato, ĝirokonto, respondkuponoj aŭ per papermono en letero.

KORESPONDADO.

1. *J. B., Buxières, D'Aillac, Francujo:* La enhavo estas bona, sed stilo kaj lingvo estas tro malfacilaj.
2. *D., Turĉiansky, Ĉeĥoslovakujo:* „Lulkanto” kun muziko aperos en venonta no.
3. *B., Zaandam (Aŭstria Esp.):* „Sorĉa nombro” ni enpresigos en venontan gazeton.
4. *W., Schattendorf, Aŭstrujo:* Bonvolu sendi novajn rakontojn.
5. *G., Bremen, Germanujo:* Via poemo ne taŭgas. Bonvolu sendi ion prozan.